

世界语诗词格律十讲

Dek Mesaĝoj Konkize Pri Esperanta Metriko

胡 国 柱

E-Librigita de Elerno

Nov.2007



Kiel estiĝas la Dek Mesaĝoj

Ĉiujare Guozhu faris certajn laborojn "ekster plano". La inspiro ofte venis de retmesaĝoj de E-amikoj. En la dua duono de oktobro 2007, du veteranoj sendis mesaĝojn al mi. La unua, estas estimata Kurisu Kei, jam 97-jara. Interalie li menciis ies proponon al li pri esp-igo de <Rakonto de Genzi>. Li trovis en tiu romano abundon da klasikaj versaĵoj, dume li ankoraŭ ne posedis Esp-an metrikon, tial la tasko fariĝas tre aŭ tro malfacila. La dua veterano estas Li Sen. Ĉar en 2007-10-24 mi versis dulingvan ĉineskon Hurao al "Chan'e N-ro 1", estimata Li Sen ankaŭ verkis eĥe. Lia poemo en la ĉina legiĝas tre bone, sed li mem ne scipovas kiel esp-igi sian poemon, ankaŭ pro baro de metriko. Inspirate de tiuj du veteranoj, Guozhu speciale skribis por ili dek mesaĝojn <Koncize pri Esperanta Metriko>. Mi esperas ke ili povas havi necesan komprenon pri Esp-a Metriko en plej malmulte da tempo, evitante la ĝenon legi dikan kaj malfacilan fak-verkegon pri tiu temo.

(GZ.2007-10-28)

缘起

国柱每年都会做一些“计划外”的工作。这类工作常常由朋友们的电子邮件而得到灵感。2007年10月下半个月，有两位长者给我来电。一位是日本的栗栖继老人，今年97岁了，谈到有人向他提议世译《源氏物语》的事。他觉得这本书中的古诗太多，而他一直未能掌握世界语诗歌的格律，所以犯难。另一位是中国的李森老，85岁了。因为国柱为嫦娥一号奔月写了双语好事近，李森老作了和诗。汉语的写得好，自不待言，可是他说不会翻译成世界语，也是被格律拦住了。受这两位前辈来电的影响，国柱为他们专门写了十封电邮，题为《世界语格律十讲》，

希望让他们用最少的时间，能够对世界语诗歌的格律有个大致的了解，而不必去捧读厚而艰深的格律专著。

(GZ.2007-10-28)

Al Legantoj

Kial ni ŝatas poezion? Ĉar ĉiuj homoj havas sentojn, diversajn, buntajn kaj abundajn: ĝojo, kolero, tristo, gajo ks, pri kiuj ni volas esprimi, verŝi, kanti, ĉanti. Kaj poezio ja povas esprimi la sentojn plej aŭ pli bone. Kiam vi legas poemojn, kun miro vi malkovris ke tio, kiu troviĝas en via koro sed ne en via parolo, kiun vi volas diri sed ne scias kiel eldiri, fakte jam delonge estis versitaj en poemoj de malnovaj poetoj, kaj eĉ tiel bone, tiel bele, tiel mirinde! Tia surprizĝojo ekster via atendo, tia elkora simpatia eĥo, restos en via memoro ĉiam neforgesebla.

Poezio markas maturiĝon de la lingvo. D-ro Zamenhof bone komprenas pri tio. Tial, dum li kreis la lingvon Esperanto, anticipe li faris multe da eksperimentoj. Li publikigis sian projekton nur tiam, kiam li sukcesis versi poemojn en Esperanto. Dank' al pli ol jarcento da komuna penado de diverslandaj Esperantistaj poetoj, nun ni jam havas pompan ĝardenon de Esp-a poezio, kie prospere disfloras senvelkaj floroj. Esp-a poezio jam atingas la saman nivelon kiel tiun de naciaj poezioj. Luj eĉ tiel diris ke "Vi ne pentos, eĉ se via lernado de Esp-o celas ekskluzive nur tion ke vi scipovos legi poemojn, originale versitajn de Kalocsay en Esperanto."

La plej granda diferenco inter poemo kaj prozo kuŝas en la formo. Poemo estu versita konforme al regulo de metriko. Tial, por legi, versi aŭ traduki poemojn, ni devas koni iom da scioj pri Esp-a metriko. Pro nepagipoveco mi ne povis aĉeti la faman <Parnasan Gvidlibron>, do mi mankopiis ĝian plenan tekston (laŭ eldono de Literatura Mondo, 1932). Dum mia lernado mi trovis ke la Esp-a metriko estas multe malsama ol la ĉina, sekve mi verkis speciale por ĉinaj esp-istoj libron <Esperanta Metriko>, kies mimeografita eldono aperis en 1973, tipografia eldono en 1983, kaj la elektronika versio farita de Vejdo aperis interrete ekde 2006 en la suba adreso kiel eLibro n-ro 0115:

<<http://www.elperno.cn/elibro/elibroj.htm>>

0115 Esperanta Metriko 世界语诗词格律 (胡国柱)

Tamen ĝi estas nur en la ĉina, do nelegebla por leganto kiu ne scipovas legi ĉine. Konsiderante pri tio, mi faris kondenson por la ĉefaj punktoj de Esp-a metriko kaj skribis ilin en dek mesaĝoj, por lego de amikoj kiuj interesiĝas pri Esp-a poezio.

Enhavo de dek mesaĝoj:

Unua Mesaĝo

§1. Enkonduko

Dua Mesaĝo

§2. Verso

2.1. ĝenerale

2.2. akcento

- Tria Mesaĝo
 - 2.3. piedo
 - Kvara Mesaĝo
 - 2.4. mezuro
 - Kvina Mesaĝo
 - 2.5. rimo
 - Sesa Mesaĝo
 - §3. Strofo
 - Sepa Mesaĝo
 - §4. Libera kaj Fiksforma Poemo
 - 4.1. ĝenerale
 - 4.2. Libera poemo
 - Oka mesaĝo
 - 4.3. Fiksforma Poemo
 - 4.3.1. hajko
 - 4.3.2. rubajo
 - 4.3.3. tercino,
 - 4.3.4. tankao
 - 4.3.5. limeriko
 - Naŭa Mesaĝo
 - 4.3.6. trioletto
 - 4.3.7. rondelo
 - 4.3.8. soneto
 - 4.3.9. akrostiko
 - Deka Mesaĝo
 - §5. Ĉinesko
 - 5.1. 忆江南 Yijiangnan aŭ Sopir-al-Sudo
 - 5.2. 十六字令 Shiliuziling aŭ Dekses-silabo
 - 5.3. 卜算子 Busuanzi aŭ Aŭguristo
 - 5.4. 调笑令 Tiaoxiaoling aŭ Flirta Kanto
 - 5.5. 钗头凤 Chaitoufeng aŭ Feniksa Harpinglo
- Koncize pri Esperanta Metriko

La Unua Mesaĝo

§1. Enkonduko

Ĉefa enhavo pri Esp-a metriko konsistas el tri ĉapitroj: Verso, Strofo, Poemo.

1. Verso: unu linio en poemo.

En terminoj de Esp-a poezio ni ne uzu la vorton “frazo en poemo”, ĉar en Esp-poemo teksto en unu verso povus esti pli longa, ĝuste egala al, aŭ malpli longa ol unu frazo je gramatika senco. Ekz-e:

> Kie vi estas? Kion vi faras ? (Z)

(Unu verso enhavas du frazojn)

- > En la mondon venis nova sento, (Z)
(unu verso egalas unu frazo)
- > Per flugiloj de facila vento
- > nun de loko flugu ĝi al loko. (Z)
(Verso estas malpli longa ol frazo, kies plena teksto skribiĝis en du versoj po dek-silabaj)
- 2. Strofo: konsistas el unu aŭ pluraj versoj sen vaka linio inter ili. Ekz-e en <La Espero> ĉiu strofo konsistas el kvar versoj.
- 3. Poemo: konsistas el unu aŭ pluraj strofoj, dividite per vaka linio inter najbaraj strofoj.
Estas forme libera poemo kaj fiksforma poemo.

La Dua Mesaĝo

§2. Verso

2.1.

Pri la verso en Esp-a poezio, ni devas lerni tri punktojn: ritmo, mezuro, rimo.
Ritmo: harmonia, regula alterno de akcentaj kaj senakcentaj silaboj.

Mezuro: la difinita nombro de silaboj, el kiuj konsistas verso. Ĝi devas esti aŭ la sama, aŭ regule varia inter versoj.

Rimo: samsoneco inter du aŭ pluraj vers-finoj, de la akcenta vokalo kaj de ĉiuj ĝin sekvantaj literoj.

Kiel ekzemplon ni prenu la unuan strofon el <La Espero>:

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugilo de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.

Lasu nin kontroli pri ĝia

ritmo: se ni signos la akcentan silabon per "—", kaj la senakcentan per "0", do, ĉiu el la kvar versoj estas aranĝita laŭ jena skemo:

—0 —0 —0 —0 —0 ;

mezuro: ĉiu verso el la strofo enhavas same dek silabojn (dek vokalojn), tre egale;

rimo: la unua kaj tria versoj interrимиĝas je "-ent-"; la dua kaj kvara je "-ok-". Ekde la akcenta vokalo, la interrимиĝantaj versfinoj havas tute samajn literojn;

2.2. akcento

Se ni jam scias ke la ritmo estas regula alterno de akcentaj kaj senakcentaj silaboj, do, antaŭ ĉio ni devas scii: kio estas akcento?

Ĉiu Esp-a vorto kun (pli ol) du silaboj havas akcenton, kiu troviĝas senescepte sur la antaŭlasta silabo. Ekz-e "mon-" en la vorto "mondo", "-gi-" en la vorto "flugilo". Krom akcenta, la ceteraj silaboj ĉiuj estas senakcentaj. Tio estas laŭ gramatika nocio.

Tamen, en Esp-a poezio estas du specoj da akcentoj: gramatika kaj ritma.

gramatika akcento: la antaŭlasta silabo en vorto, laŭ gramatiko nature ĝi estas

akcenta.

ritma akcento: origine ĝi ne estas la antaŭlasta silabo en vorto, sed laŭ bezono de ritmo ĝi fariĝis akcenta.

Ekz-e, en la verso "nun de loko flugu ĝi al loko" estas kvar unusilabaj vortoj: nun, de, ĝi, al.

Ili estas egalaj. Unusilaba vorto devas esti senakcenta. Sed ĝi estas la kvara verso en la kanto <La Espero>, ĝia ritma skemo devas esti jena:

— o — o — o — o — o

"nun" kaj "ĝi" staras en la loko de akcento laŭ bezono de ritmo, kaj ili fariĝis "akcenta".

kaj "de" kaj "al" staras ne en la loko de akcento, do ili rajtas ne ŝanĝiĝi, do restu ankoraŭ "senakcenta".

La du vortoj "nun de" estas kune legata kvazaŭ "nunde"; "ĝi al" kvazaŭ "ĝial", kaj ili havas akcenton en la "antaŭlasta silabo".

En poezio, la fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭigata per apostrofo. Ekz-e la vorto "koro" skribiĝis kiel "kor'", kaj "de la" kiel "de l'" (legata kiel "del"), sed la loko de akcento restu senŝanĝa.

En la sekvaj tekstoj, ni signos la "gramatikan akcenton" per "=", kaj la "ritman akcenton" per "—".

La Tria Mesaĝo

2.3. piedo

Ritmo estas regula alterno de akcentaj kaj senakcentaj silaboj, do "piedo" estas la fundamenta unuo de tia alterno.

Ni jam sciis, ke la versoj en <La Espero> kiel ekz-e

En la mondon venis nova sento

kc sonas laŭ suba ritmo : —o —o —o —o —o

(akcenta-senakcenta/ akcenta-senakcenta /akcenta-senakcenta/
akcenta-senakcenta/ akcenta-senakcenta)

Evidente, la fundamenta unuo (piedo) konsistas el "akcenta-senakcenta" du silaboj.

En tiu verso estas kvin piedoj, mallongige ni signas per "—o 5".

En Esp-a poezio, estas kvin specoj da piedoj plej ofte uzataj :

- (1) (—o) , "akcenta - senakcenta" estas nomata "trokeo";
- (2) (o—) , "senakcenta - akcenta" estas nomata "jambo";
- (3) (o—o) , "senakcenta - akcenta - senakcenta" estas nomata "amfibrakto";
- (4) (oo—) , "senakcenta - senakcenta - akcenta" estas nomata "anapesto";
- (5) (—oo) , "akcenta - senakcenta - senakcenta" estas nomata "daktilo".

El la supremenciitaj piedoj, "akcenta - senakcenta" piedo kaj "senakcenta - akcenta - senakcenta" piedo, leksikone ambaŭ havas la samajn limojn kiel la vorto mem, do facile kompreneblaj.

Dume, ni povus rigardi la ceterajn tri specojn da piedoj variantoj de la supraj du

piedoj. Ekz-e:

(2) jambo (o—) , "senakcenta - akcenta"

> Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,

Teorie tiu verso dividiĝis laŭ skemo

o = /o =/o =/ o—/o =/ o

(senakcenta - akcenta/ senakcenta - akcenta/ senakcenta - akcenta/
senakcenta - akcenta/ senakcenta - akcenta/ senakcenta)

Sed ni povas tiel dividi laŭ leksikonaj limoj de vortoj

o / = o/ =o/ = o—o/ = o

(senakcenta/ akcenta - senakcenta/akcenta - senakcenta/akcenta -
senakcenta/akcenta - senakcenta/akcenta - senakcenta),

ni facile vidas, ke antaŭ regula trokea verso

>mia kor', ne batu maltrankvile

aldonu unusilaban vorteton "Ho", la ritmo ŝanĝiĝis jamba.

(3) amfibrako

> Tra densa mallumo briletas la celo

Ni dividu laŭ naturajn limojn de la vortoj, kaj la skemo estas o=o /o=o/ o=o/
o=o

(4) anapesto

> Ĝis la bordo de klara fonteto

antaŭ regula amfibraka verso

> la bordo de klara fonteto (o=o /o=o/ o=o)

aldonu unusilaban vorteton "Ĝis", tiam la ritmo ŝanĝiĝis anapesta (oo=/ oo=
oo=/ o).

(5) daktilo

> Brilas reklamoj nun malpli amuze (=oo/ =oo/ —oo/ =o)

Tia verso vere ŝajnas ke mankas la unua silabo al la unua piedo (o=o) en
regula amfibraka verso.

Rimedo por aperigo de novaj versoj per derivado ekzistas pli ol unu. Ekz-e, se
ni aldonu trisilaban vorton antaŭ regula trokea verso, ni ankaŭ povas ricevi
jamban verson. Kaj, estas permesate, ke tiu trisilaba vorto, krom normala
lokiĝo je la unua piedo, je necesa okazo "glitus" al la dua piedo en la verso,
ekz-e:

> Drama aktoro estis mia patro.

(=o/ o=o/ =o/ =o/ =o)

De tio ni povas scii, ke la teoria limo por dividi piedojn ofte estas ne sama ol
la natura limo de vortoj. Kaj, por pli facila kompreno, ni ofte preferas skemi laŭ
natura limo de vortoj.

En verso, ĉiuj piedoj estas eble tute samaj (ekz-e en <La Espero> ĉiuj
piedoj estas trokeoj), sed ankaŭ povus kun nesamaj piedoj, mikse uzataj.
Ekz-e:

> Forte ni staru, fratoj amataj (Z)

=o / o=o/ =o/ o=o

(akcenta - senakcenta/senakcenta - akcenta - senakcenta/ akcenta -

senakcenta/senakcenta - akcenta - senakcenta),
entute dek silaboj en kvar piedoj (trokeo/ amfibrako/ trokeo/ amfibrako).

> ripozu: via ama laboro ne pereis. (A)

o=o/=o/=o / o=o/—o/=o

(senakcenta - akcenta - senakcenta/akcenta - senakcenta/akcenta -
senakcenta//senakcenta - akcenta - senakcenta/akcenta - senakcenta/akcenta
- senakcenta), entute dek kvar silaboj en ses piedoj (amfibrako/ trokeo/
trokeo//amfibrako/ trokeo/ trokeo).

Verso en tiu skemo estas tre utila, ofte uzata, kaj ĝi eĉ havas propran nomon:
aleksandro.

La Kvara Mesaĝo

2.4. Mezuro

Ni jam sciis (de §2.1.) ke mezuro estas la difinita nombro de silaboj, el kiuj konsistas verso.

Kiom da silaboj estas en unu verso? Ho, la respondo estas sufiĉe libera!

Ĉar en Esp-a poezio ekzistas tia regulo: Se vi ne povas fin-skribi frazon en unu(a) verso, vi rajtas daŭrigi en la sekvanta: en la dua; kaj, se vi ankoraŭ ne povas fin-skribi la frazon en la dua verso, vi rajtas daŭrigi en la tria.....; kaj, se vi ne povas fin-skribi frazon en unu(a) strofo, vi rajtas daŭrigi en la sekvanta strofo. Tiu regulo skribi trans versoj kaj strofoj estas termine nomata “transpaŝo”. Ekz-e la suba frazo estas skribita en kvar versoj:

Estas ĉiam

pli kaj pli
da reĝinoj
ĉirkaŭ mi.

Tio fariĝis kompleta kvarversa strofo.

Ĉar en Esp-a poezio la fina vokalo de la substantivo (kaj de la artikolo) povas esti forlasata kaj anstataŭigata per apostrofo, kaj ekzistas la eblo de “transpaŝo”, tial, la plej mallonga verso povas esti el unu silabo. Kaj, sperta poeto eĉ povas verki normalan poemon el tiuj unusilabaj versoj. Ni legu ekz-e la soneton <Mateno>, versitan de Sylla Chaves, brazila Esp-poeto. La soneto kantis pri la gaja humoro de juna paro sub maja suno:

Nun
maj'
kaj
sun
Kun
gaj'
kaj
jun'.

Ĉi—
ni
du,
Do
ho
ĝu'

Tiel mirinda soneto estas neimagebla ekz-e en la ĉina poezio. Alia ekzemplo tre similas al la "pagoda poemo" en la ĉina, kies versoj estas laŭvice kun pli kaj pli multiĝantaj silaboj.

Nun
la lun'
mortpale
al vandale
freneza taĉment'
de l' fulma element'...

Tamen, versoj kun malpli ol 5 aŭ pli ol 14 silaboj montriĝas neoportunaj en praktika versado. Kaj, en Esp-a poezio, la plej ofte uzataj versoj estas kun 11 kaj 14 silaboj, ekz-e:

> Jen sidas ŝi kun lipoj kunpremitaj (11 silaboj)

> ankoraŭ freŝe floras la versorojzoj ravaj (14 silaboj)

La Kvina Mesaĝo

2.5. Rimo

2.5.1 Laŭ rimo Esp-aj poemoj estas dividitaj en du specoj: kun-rima kaj sen-rima.

Senrima poemo konsistas el "blankaj versoj". Multaj dramoj de Ŝekspiro (ekz-e Hamleto, Otelo... kc) estas verkitaj en tiaj blankaj versoj. Tamen, pli multaj poemoj estas kun rimoj.

2.5.2. En ĉina poezio, la rimoj sidas je lasta ideogramo de rimitaj versoj. Tamen en Esp-a poezio, la rimoj ĉiam sidas je "antaŭlasta" silabo (nome, la gramatika akcento) de rimitaj vortoj en interrimitaj versoj. Atentu, ke Esp-aj versoj neniam interrimiĝas per la lasta silabo (nome, la gramatikaj finaĵoj -o,-a,-as... ks) de la rimitaj vortoj. Ekz-e en la unua strofo de <La Espero>, la unua kaj tria versoj interrimiĝas per "sento/ vento", kaj, la dua kaj kvara versoj per "voko/ loko".

Tamen, kiel ni jam konis, ke en Esp-a poezio, la fina vokalo de la substantivo (kaj de la artikolo) povas esti forlasata kaj anstataŭigata per apostrofo. Ekz-e "sento" tiam fariĝis "sent'". Sed la loko de la gramatika akcento ne ŝanĝiĝis pro la apostrofo. La akcento ankoraŭ sidas je la silabo "sent'". Do okazas verŝajna interrimiĝo per tia "lasta silabo". Por forigo de miskompreno, en Esp-a poezio oni nomas diference per du malsamaj fakaj terminoj pri ili.

(1) Ina rimo: la rimita vorto skribiĝas sen apostrofo, ekz-e "sento", la akcento ankoraŭ sidas je antaŭlasta silabo "sen-".

(2) Vira rimo: la rimita vorto estas sen origine lasta silabo, ekz-e "sent'", tiam la akcento sidas je tiu "lasta" silabo.

Poemoj en la fama serio de <Sekretaj Sonetoj> ĉiuj estas versitaj per interplektitaj versoj de ina kaj vira rimoj. Ni legu la unuan strofon de la oka soneto (ĉiuj versoj enhavas 5 piedojn jambajn):

Ho, sopirata horo rendevua
en maja bosko ! Kaj dum la promen'
en kaŝa loko trema ĉirkaŭpren'
kaj longa, longa, longa kis' unua.

La unua kaj kvara versoj interrimiĝas per ina rimo "rendevua/ unua";

La dua kaj tria versoj interrimiĝas per vira rimo "promen'/ ĉirkaŭpren'"

2.5.3. Poetoj en la unua tempo de Esp-a poezio estis senspertaj. Ili aldonis al nerimitaj vort(radik)oj (ekz-e; amas, iras) saman sufikson -ad-, kiu ĝuste sidas je la "antaŭlasta silabo" (gramatika akcento), kaj tiel realigis interrimiton "amadas/ iradas".

Kun maturiĝo de Esp-a poezio, oni ne plu aprobas tiel facilaniman rimigon, kaj eĉ donis al ĝi specialan nomon "adasismo".

Nuntempe, Esp-aj poetoj inklinas al tia regulo, ke, en la paro da interrimitaj versoj, estas aldoni sufikson nur al unu verso, dume la alia verso devas rimiĝi per radikoj. Ekz-e

zumi/ okulumi, spado/ irado, bona/ duona ,

tiam la skriboj "um,ad,on" en la unua(j) vorto(j) fakte ne estas gramatikaj sufiksoj.

2.5.4. La plej ideala rimo estas tia: ekde la akcenta vokalo, ĉiuj sekvaj literoj estas tute samaj. Ekz-e

abio/ krio, kara/ amara, sendi/ pendi, ventro/ pentro....

Ĝi estas nomata "pura rimo".

Tamen, se ni katenus nin ĉiam per tiu "pura" regulo, okazos konsekvence domaĝa limigo al la nombroj de uzeblaj rimoj.

Por plimultigi uzeblajn rimojn, Esp-aj poetoj trovis helpajn rimadojn, ekz-e permesi uzi konsonantojn, kies prononcoj estas parencaj, ekz-e

bo-po, do-to, ĝo-ĉo, go-ko, ro-lo, vo-fo, zo-so, ĵo-ŝo

Dank' al tiu permeso, la sekvaj vort-paroj ankaŭ sukcesas rimiĝi.

kabo/ kapo, nodo/ noto, loĝi/ diboĉi, ege/ seke, kuras/ lulas, naiva/ soifa, kazo/ kaso, aĵo/kaŝo

Tio estas rimigo per "rimoidoj". Estas pli multaj "rimoidoj" ol la supremenciita.

La Sesa Mesaĝo

§ 3. Strofo

3.1. Strofo konsistas el iom da versoj. Nombro de verso(j) en unu strofo povas esti minimume nur unu, sed maksimume ĝis senlima, t.e. la tuta poemo en unu strofo.

Plej ofte uzataj strofoj estas: triversa, kvarversa, kvinversa, sesversa, okversa...ktp.

Se en unu poemo estas pluraj strofoj, skribe ili estu dividitaj per vaka linio. Ekz-e, en <La Espero> estas kvarversaj strofoj, dividitaj de vaka linio inter najbaraj strofoj.

3.2. Strofo el blankaj versoj vidiĝas sen rimaj trajtoj. Tamen, strofoj el rimaj versoj kolorriĉas pro la malsamaj rimaranĝoj. Ni signu tian rimaranĝon per minuskloj, el kiuj la litero x signas senrima. La plej ofte uzataj estas jenaj.

1. Duona rimo, nur duono de la versoj estas rimaj, ekz-e: x a x a.

Mi ĝis nun vivas
en plena sano,
neniel pensas
pri la nirvano.

2. Kontinua rimo, laŭ rimaranĝo de aaaa, bbbb, cccc ...

Magda Carlsson(1896-)
RIMEKZERCO PRI MALNOVA TEMO
Sub sorĉolerta luno sidi,
Tenere kisi, mole ridi,
al nupto flame ekavidi,
Sin pene bridi.
Post duonjar' - en hejmo kuna,
Feliĉo suna, lit' komuna !
Amludo kun malsperto juna,
Ekstaz' plenuma !
Jardek pasis. Rare ridi,
En ĉiutaga ted' acidi,
Ĉe l' radiofono triste fridi,
Rutinkoiti.

3. Para rimo, laŭ rimaranĝo de aa, bb, cc, dd...

La suno for.
Silenta hor'.
En vento, sub
Pelata nub'.
Vagadas nun
La reva lun',
Kiele sur
Ruina mur'...

4. Krucrimo, laŭ rimaranĝo de a b a b

Vd ekz-e <La Espero>

5. Ringa rimo , laŭ rimaranĝo de a b b a

N.Kurzens

PRO KIO

Pro kio mi estu afabla

kaj kial mi penu rideti,

ĉe l' koro la manon surmeti

kaj diri, ke ĉio - agrabla ?

Se l' kor' pro indigno sangbolas,

do kial sen fin' hipokriti ?

Disŝiri la Decon kaj spiti,

kaj esti malbona mi volas.

(6) Robaja rimo, laŭ rimaranĝo de a a x a, kiu tre similas al tiu en la ĉina verskvaro.

Li Bai (701-762)

NOKTA PENSO

Antaŭ lito blanke brila luno floras,

Super tero kvazaŭ prujno blankkoloras,

Kapolevo: brilan lunon mi rigardas,

Kapoklino: naskvilaĝon mi memoras.

(trad. Kalocsay)

3.3. Krom la kvarversaj strofonoj, ofte vidiĝas ankaŭ la subaj (sen rimaranĝaj ekzemploj)

1. Duversaj strofoj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc...

2. Triversaj strofoj, laŭ rimaranĝoj de "aaa,bbb,ccc..." aŭ "axa", aŭ "xaa", aŭ "aax".

3. Kvinversaj strofoj, laŭ rimaranĝoj de "ababa", aŭ "ababb", aŭ "abbaa", aŭ "abbab", aŭ "abaab".

4. Sesversaj strofoj, laŭ rimaranĝoj de "aabccb", aŭ "aabbcc", aŭ "ababab", aŭ "abccba".

5. Okversaj strofoj, laŭ rimaranĝoj de "ababbcbc", aŭ "ababcccb", aŭ "abababcc".

3.4. En unu strofo la versoj ritme povas esti aŭ samaj aŭ diversaj. Sed, kontrolate, ĉiu unuopa verso devas obei postulojn de ritmo en poezio. Ĝi ne estu sendiferenca ol frazo en ordinara prozo.

La Sepa Mesaĝo

§4. LIBERA KAJ FIKSFORMA POEMO

4.1. Ĝenerale

Poemo povas konsisti el unu strofo, sed ankaŭ povas el du aŭ pli multe da strofoj.

Strofoj, kiuj konsistigas poemon, povas esti samspecaj, aŭ diversspecaj.

Poemo versita en forme samaj strofoj, kun sama ritmo, sama mezuro, sama rimaranĝo, estas nomata metrika. <La Espero> estas tipa ekzemplo.

Poemo versita en arbitre aranĝitaj strofoj, estas nomata "Libera poemo".

Poemo versita en regule aranĝitaj strofoj, estas nomata "Fiksforma poemo".

El la fiksfarmaj poemoj, tiuj versitaj laŭ reguloj de ĉina fiksfarma poezio, estas nomata "ĉinesko".

4.2. Libera poemo

Tradicia metrika poemo karakteriĝas per regulaj versoj kun unuecaj ritmo, mezuro kaj rimado; kaj en skribo kun multaj reguloj malsamaj ol en prozo, ekz-e, la unua litero en ĉiu verso estu majuskla, maldekstro de ĉiuj versoj staru samloke vertikale. Deviga uzo de interpunkcio.

En sia formo, la libera poemo estas multe pli libera en ol la metrika. Aŭtoro de libera poemo rajtas libere versi laŭ sia bontrovo ĉiuflanke.

Strofo: Ĉu poemo estu en unu aŭ pluraj strofoj, ĉu la strofoj estu forme samaj aŭ variaj, ĉio laŭ deziro de aŭtoro.

Verso: en kia ritmo, mezuro, rimo kaj rimaranĝo, ĉio laŭ deziro de aŭtoro.

Skriba formo: sen deviga uzo de interpunkcio, sen nepra majuskligo de la unua litero de ĉiuj versoj, sen deviga vertikala samlokiĝo. Ekz-e:

Rejna de Jong (1922-)

ABSURDAĴO

Ni ĉiuj parolas

la saman lingvon,

la nederlandan.

Mi konas la vortojn,

sed mi ne komprenas.

Por distro

mi lernis Esperanton.

Nun mi komprenas

kelkajn

samlandanojn.

Ĉi tiu poemo estas en tri strofoj, kun malsamaj mezuroj.

La unua strofo estas kvinversa, la dua strofo: duversa, kaj la tria strofo: triversa.

Versoj estas en malsamaj mezuroj, kun 6,5,5,6,6/ 3,7/ 5,2,4 silaboj, tute arbitre, senregule, sen rimoj, vere libera formo.

La Oka Mesaĝo

4.3. Fiksforma Poemo

En poezio de diversaj nacioj ekzistas poemoj versitaj laŭ difinitaj formuloj, kiujn oni nomas "Fiksformaj poemoj".

Dum evoluo de Esp-a poezio, multaj fiksfarmaj poemoj de diversaj nacioj jam estas importe kondukataj, kiuj kune elvartis grandan ĝardenon kie prospere kaj pompe disfloras centoj da floroj konkursante per allogaj beloj. Kompare al rigora regularo de la ĉina fiksfarma poemo, tiu en Esp-a poezio plejofte havas nur devigo pri versa nombro kaj rimaranĝo en strofo(j), do ŝajnas pli senĝena. Nun ni konigu al vi kelke da plejofte uzataj skemoj.

1. Hajko

Fiksforma poemeto el japana poezio. El tri versoj, respektive kun 5, 7, 5 silaboj, rimiĝas la unua kaj la tria versoj.

Macuo Baŝo (1644—1694)

Lag' forlasita,
kaj muta. Plaŭd'. Ensaltis
rano subita.

--- el Eterna Bukedo, p.54(Trad.Kalocsay)

(2) Robajo

La nomo devenas dank' al la mondfama poemaro <Robajoj> de Omar Kajam. Tre similas al la verskvaro en la ĉina poezio. El kvar versoj, rimiĝas la unua, dua kaj la kvara versoj. Sen limigo pri ritmo kaj mezuro de verso. Kiel ekz-e ni citas du tradukojn de la robajo XI, laŭdire plej fama el la nomita poemaro.

> Unua traduko

Omar Kajam (1048-1122)

ROBAJO (XI)

Dum sub ĉi arbo sidas mi, kun pano,
Vino kaj versoj pretaj al la mano -
Kaj apud mi vi kantas en dezerto -
Tiu dezerto estas jam nirvano.

Tradukis Willam Auld per kvinjambaj versoj, kun 11 silaboj en ĉiu verso.

> Dua traduko

Omar Kajam (1048-1122)

ROBAJO (XVI)

Se eble, havi bulon da purtritika pano,
ŝafidan klapon, kruĉon da vino ĉe la mano,
kaj sidi ambaŭ en la soleco de l' Ruinoj ---
jen ĝu' ekster atingo de iu ajn sultano.

El la persa tradukis Gaston Waringhien, per aleksandraj versoj, kun 14 silaboj en ĉiu verso.

(3) Tercino

Devenis el itala poezio. El triversaj strofoj, kies rimoj faras seninterrompan ĉenon, laŭ skemo "aba, bcb, cdc, ded...". Sen difinita longo, ĉu el dekkelkaj aŭ ĝis centoj da versoj. La granda poeto Dante verkis per tiu tercina formo majstran poemaron <Dia Komedio> en tri volumoj, kun cent kantoj de 14233 versoj. Sed en tercino estas nepermesata la samtempa miksuzado de versoj kun malsamaj ritmo kaj mezuro. Sube estas el lasta parto de la fama <Odo al la Okcidenta Vento> de Percy Bysshe Shelley.

Percy Bysshe Shelley(1792-1822)

Odo al la Okcidenta Vento

Min, kiel boskon, igu liro via,
Eĉ se mi estos same sen foli' !

Via tumult', potence harmonia

Nin ambaŭ vekos por aŭtuna kri'

Dolore dolĉa. ho, Spirit' renversa,

Estu spirito mia ! Estu: mi !

Ĉi mortajn pensojn tra l' spac' universa

Dispelu, kiel velkajn branĉojn, por

akcel' de nova nask'. Sub sorĉo versa,

Kiel fajruj-ardaĵon, ŝutu for

Ĉi vortojn miajn tra la homa gent' !

Estu tra mia lip' trupetsonor'

Profeta al la dorma ter' ! Ho Vent' !

Se vintras, ĉu ne venos jam Printemp' ?

--- el Eterna Bukedo, p.158 (Trad.Kalocsay)

(4) Tankao

En japana poezio, la plej ofte uzataj versoj estas kvinsilaba kaj sepsilaba. Kaj, la plej ofte uzataj fiksformaj poemoj, krom "hajko", estas "tankao" (utao). Formulo de tankao estas: 31 silaboj en kvin versoj. Alterne uzi la kvinsilaban kaj sepsilaban versojn dufoje, plus unu sepsilaba verso (do, en 5,7,5,7,7 silaboj), tio fariĝis "tankao" (laŭlitere: mallonga kanto). Se tia alterna uzado de kvinsilaba kaj sepsilaba versoj superis tri fojojn, kaj plus unu sepsilaba verso, tio fariĝas "long-utao" (longa kanto).

Rimiĝo en tankao estas libera, aŭ sen rimoj (ĉiuj versoj restu blankaj), aŭ rimiĝus paro aŭ du paroj da versoj. Post enkondukiĝo en Esp-a poezio, tankao estas tre bonvena ĉe diverslandaj poetoj. Ne nur japanaj, sed ankaŭ alilandaj poetoj versis tankaojn. Ekz-e, sube legiĝis poemo el serio da 12 tankaoj, versita de ĉina Esp-a poeto Armand Su en 1979.

Armand Su (1936-1990)

TANKAOJ (3)

En mia mano

via leterfolio

tiel leĝera.

Sed iĝas ĝi l' plej peza

pro amikeco vera.

(5) Limeriko

Devenis el "limerick" de angla poezio. El kvin versoj, respektive kun 3,3,2,2,3 piedoj, laŭ rimaranĝo de "a a b b a ". Ofte havis ŝercan efikon per enhavo absurda aŭ erotika. Ekz-e

Junulo en urbo Tifliso
Salutis fraŭlinon per kiso.

Unue, ŝi miris,

Sed poste ŝi diris:

"Mi havas la tempon por biso !"

La Naŭa Mesaĝo

(6) Trioletto

Devenis el franca poezio. El ok versoj sen deviga difino pri ritmo. Laŭ rimaranĝo de "AbaA abAB" , la majuskloj signas ripeton de la unua verso post la tria kaj de la du unuaj post la sesa. Ekz-e:

Wang Chongfang (1936-)

KRIZANTEMO

Odore floras krizantem',
mirinde nobla, neĝe pura;
dum blovas frosta ventoĝem',
odore floras krizantem'.
Jam mortas papilia trem',
sed ridetadas flor' ebura.
Odore floras krizantem',
mirinde nobla, neĝe pura.

(7) Rondelo

Devenis el franca poezio. El 13 versoj en 4 strofoj, respektive kun 4,4,4,1 versoj, verkita sur du rimoj, laŭ rimaranĝo de "ABba,abAB,abba,A", la majuskloj signas ripeton de versoj. Sen deviga difino pri ritmo, sed ĉiuj versoj estu kun sama ritmo.

Kvankam sen deviga difino pri la mezuro de versoj, tamen, post kiam Kalocsay verkis per tiu formo poemaron <Rimportreto>, li kvazaŭ kreis specialan formulon nomatan "rimportreto", kiu estas el kvarjambaj versoj en 9 silaboj. Ekz-e:

Unua ekzemplo

Kalocsay (1891-1976)

RIMPORTRETO XXVII

Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe

Droninta vive en la morto.

Kia mister-malica forto

Vin povis de ni preni rabe ?

Ni lernis de vi lernantknabe

Kuiri en la stilretorto.

Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe
Droninta vive en la morto.

Kaj nun ni miras gape, strabe
pri via karier-aborto.
Al vi la Esperanta vorto
Nun eble sonas jam arabe...

Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe !

Dua ekzemplo

Guozhu:

Kurusu Kei sur UK-podio
(2007-08-05)

Kurusu Kei, ĉiam justama,
dumviva strebad' por racio,
por Esperanto, por socio.
Legendas lia vivo drama.

Dulingva tradukisto fama,
dojen' vivanta fosilio.

Kurusu Kei, ĉiam justama,
dumviva strebad' por racio.

Kiam li per parolo flama
salutas sur UK-podio,
okazis vera sensacio,
tondras al li hura' aklama!

Kurusu Kei, ĉiam justama.

(8) Soneto

En Ĉinio oni ankaŭ nomas soneton "14-versa poemo". Tre ofte uzata en Esp-a poezio. Devenis el itala poezio kaj disvastiĝis tra tuta Eŭropo. Legiĝas multaj famaj verkoj de famaj poetoj diverslandaj. Kvankam ĝi estas en "fiksa" formo, tamen en praktiko la formo fariĝis multe varia.

(8.1) El 14 versoj

en 4 strofoj, respektive kun 4,4,3,3 versoj,
aŭ en 4 strofoj, respektive kun 4,4,4,2 versoj,
aŭ en 2 strofoj, respektive kun 8,6 versoj,
aŭ en 2 strofoj, respektive kun 12,2 versoj,

(8.2) Kun rimoj.

(8.3) Rimaranĝo de la unuaj 2 kvarversaj strofoj estu samaj,

laŭ "abba,abba" (ringa rimo)

aŭ laŭ "abba,cddc" (ringa rimo)

aŭ laŭ "abab,abab" (krucrimo)

aŭ laŭ "abab,cdcd" (krucrimo)

(8.4) rimaranĝoj de lastaj 6 versoj

laŭ "cdc,dcd" (memoru kiel "cdcd, cd", krucrimo)
aŭ laŭ "ccd,ede" (memoru kiel "cc, dede", krucrimo)
aŭ laŭ "cdc,dee" (memoru kiel "cdcd, ee", krucrimo)
aŭ laŭ "ccd,eed" (memoru kiel "cc,deed", ringa rimo)
aŭ laŭ "cdd,cee" (memoru kiel "cddc, ee", ringa rimo)
aŭ laŭ "cde,cde" ", krucrimo.

Rimaranĝo en la suba ekzemplo estas laŭ "abba,abba,ccd,eed"

William Auld (1924-)

EN MIA MIO

En mia mio kaŭris infaneto,
kvazaŭ en ĉambro vasta kaj obskura,
timante eĉ per timlament' murmura
provoki la koleron de l' kvieto.

Kaj vi hezite tra la ombroreto
alvenis kiel orfo malsekura
al mia ĉambro kava kaj terura,
kaj antaŭ vi forfuĝis la obsedo:

fide mi vin salutis ĝojmiene
ĉar via ĝojmieno pruvis plene,
ke en mi simpation vi rekonas.

Kaj nun ni kune vagas lok-al-loke
en la malluma dom', kaj reciproke
kuraĝon ĉerpas kaj kuraĝon donas.

Alia fama soneto de Ŝekspiro, laŭ rimaranĝo de "abab,cdcd,efef,gg"

William Shakespeare (1564-1616)

el LA SONETOJ XVIII (第十八首)

Ĉu mi komparu vin al tag' somera ?

vi estas ja pli bela kaj serena:
majflorojn ofte vipas vent' severa,
kaj tro maldaŭras la somero bona.

jen, brogas la okulo de l' ĉielo,
Jen vualiĝas ĝia vido ora.

Kaj iam senbeliĝas ĉiu belo
laŭ voj' natura aŭ pro fat' rigora.

Sed jam ne velkos via plensomero
nek dekliniĝos de l' beleco nuna;
la Morto vin ne tenos kun fiero,
se vin la vers' eterna gardas juna:

Dum homoj spiros kaj okuloj vidos,
Vivante en vivanta vers' vi sidos.


--- Traduks R.Rossetti

(9) Akrostiko

Akrostiko ne estas speciala fiksforma poemo. Ĝi estas poemo, en kiu la unua litero de ĉiu verso formas vortojn.

Miĉino (1938-)
Akrostiko
—Laŭ ĉinesko Sopir-al-Sudo
Anoncas
Grupo Kantona
Al ni novan prosperon.
Debuto verde sprona,
Uvo — fruktdona !
(La unuaj literoj formas vorton "AGADU")

La Deka Mesaĝo



§5. Ĉinesko

Se alilandaj fiksformaj poemoj, ĉu el la Okcidento aŭ el la Oriento, ĉiuj povis senprobleme eniri Esperanton kaj fariĝis "familiaj juveloj" en la esperanta poezio, do, estas facile kompreneble, ke la fiksformaj poemoj de la ĉina poezio, kies historio daŭris jam mil jarojn, ankaŭ rajtas kaj povas eniri Esperanton. Ĉinaj esp-istoj faris provojn tiufланke ekde 1973, kaj, dank' al persistema penado de jardekoj, nun jam havas ĝojindan rikolton. La nombro de ĉineskoj, versitaj de multaj s-anoj dum multe da jaroj, nun jam superis 1000, kiuj aperas kiel 5 dikaj poemkolektoj.

Nombro de ĉinaj fiksformaj estas tiel granda. Laŭ <Imperie Oficiala Fiksformaro de Ci-o> eldonita en Qing-dinastio(1644-1911), estis resume 2306 skemoj por ci-oj, kaj 581 por arioj, el kiuj la plej ofte uzataj nombriĝas ĉ.

50. En gvidlibro <Ŝlosilo de Ĉinesko> verkita de Guozhu, estas konigataj 81 skemoj. Sube ni donas 5 plej ofte uzatajn.

--

5.1. Yijiangnan aŭ **Sopir-al-Sudo**; 35,77,5

Sam:

Nokta Penso

—laŭ ĉinesko Sopir-al-Sudo

(2007-3-8)

Plenluno

prujneske brilas.

Kapleve mi ĝin spektas.

Mi al hejmlok' sopiras.

Vagpenso iras.

* Yijiangnan (Sopir-al-Sudo) : ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 3,5,7,7,5 silaboj laŭ rimaranĝo de x,a,x,a,a (x = senrima).

--

5.2. Shiliuziling aŭ **Dekses-silabo**; 1,7,35

Mao Zifu (1963-)

FOTO

---laŭ ĉinesko Shiliuziling

Sub

fera ponto, rida bub'.

Spiralaĵ'

inter li kaj nub'.

* Shiliuziling (Dekses-silabo): ĉina fiksforma poemo el 4 versoj de 1,7,3,5 silaboj laŭ rimaranĝo de a,a,x,a (x = senrima).

--

5.3. **Busuanzi** aŭ Aŭguristo; (55,75)x2

Komencantino:

Zamenhofa Tago 2006

—laŭ ĉinesko Busuanzi

(2006-12-15)

portreto Ava

hel-verda flago

solena datreven' de

Zamenhof-Tago

Ni sang-ĵuras por

estonta ago

Esperanto ne estas

ŝajna imago

* Busuanzi (aŭguristo) : ĉina fiksforma poemo el du strofoj el versoj de 55,75 silaboj laŭ rimaranĝo de x,a,x,a (x = senrima).

5.4. **Tiaoxiaoling** aŭ Flirta Kanto; 2,2*,6;6,6;2**,2*,6 | aAa bb cCc

Veĵdo:

novjara beno

—laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling

(2007-02-18)

ĝoje, ĝoje

ĉiujare foje

kun novjara beno

al sukcesa veno

nove, nove

ekmarŝu denove

* Tiaoxiaoling (Flirta Kanto): ĉina fiksforna poemo el 6 versoj de 4,6,6,6,4,6 silaboj, laŭ rimaranĝo de a,a,b,b,c,c. La kvarsilabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj [ĝoje,ĝoje; nove,nove]. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. [ve-no, no-ve].

5.5. Chaitoufeng aŭ **Feniksa Harpinglo** (3,3,7;3,3,44,1,1*,1*)x2 |

aaa;bbxbbBB

Guozhu:

KURTA AM'

--- laŭ ĉinesko Feniksa Harpinglo

Dolĉa am',

juna flam',

lulis nin feliĉa gam'.

Ni ja tre

dubis ke

kiuj folis

pli ol ni ge ?

Ne, ne, ne !

Kurta am'

pasis jam.

Estingiĝis juna flam'.

Min ja tre

ĝenis ke

ĉio iĝis

morta pase'.

Ve, ve, ve !

* Chaitoufeng (Feniksa Harpinglo): ĉina fiksforna poemo el du strofoj el versoj de 3,3,7,3,3,4,4,3 silaboj, laŭ rimaranĝo de a,a,a,b,b,x,b,b; a,a,a,b,b,x,b,b (x = senrima). Kaj la lasta verso de strofo devas esti tri samaj silaboj.

De la supraj ekzemploj ni povas scii, ke preskaŭ ĉiuj ĉinaj fiksfarmaj poemoj estas enkondukeblaj en Esperanton. Sed ni devas tiel fari ke la skemo de ĉinesko estu tute sama je strofo(j), versoj, silaboj kaj rimaranĝo kiel tiu en la ĉina poezio.

第十讲

§5. Ĉinesko 由汉语引入世界语中的词牌

既然别国的诗词形式，不论是西方的还是东方的，都可以成功地引入世界语，成为世界语诗歌中的“家珍”，那么，有着几千年悠久历史的汉语诗歌，其特有的诗歌形式当然也应该是可以引入的。中国的世界语者从 1973 年起开始进行这方面的探索，经过多年不懈的努力，终于取得了可喜的成绩。由多人多年创作的 ĉineskoj，总数已经超过了千首，结集出了五大本诗集。

中国词牌的数量极多。清代《钦定词谱》收 2306 个，曲调 581 个；最常用的也有 50 个以上。国柱编著的《中国风入门》一书，介绍了 81 个词牌。以下举 5 个最常用的词牌为例。

5.1. 忆江南 Yijiangnan aŭ Sopir-al-Sudo; 35,77,5

5.2. 十六字令 Shiliuziling aŭ Dekses-silabo; 1,7,35

5.3. 卜算子 Busuanzi aŭ Divenisto; (55,75)x2

5.4. 调笑令 Tiaxiaoling aŭ Flirta Kanto; 2,2*,6;6,6;2**,2*,6 | aAa bb cCc

5.5. 钗头凤 Chaitoufeng aŭ Feniksa Harpinglo; (3,3,7;3,3,44,1,1*,1*)x2 |
aaa;bbxbbBB

5.1. 忆江南 Yijiangnan aŭ Sopir-al-Sudo; 35,77,5

其格式要求为：共五个诗行，分别为 3,5,7,7,5 个音节，第 2,4,5 行押 xaxaa 韵。其他不作规定。

§.420 sam 2007-3-8 9:21:18

Nokta Penso

—laŭ ĉinesko Sopir-al-Sudo 忆江南

plenluno

prujneske brilas

kapleve mi ĝin spektas

mi al hejmlok' sopiras

vagpenso iras

5.2. 十六字令 Shiliuziling aŭ Dekses-silabo; 1,7,35

格式要求为：共四个诗行，分别为 1,7,3,5 个音节，第 1,2,4 行押 aaxa 韵。

Mao Zifu (1963-)

FOTO

---laŭ ĉinesko Shiliuziling

Sub

fera ponto, rida bub'.

Spiralaĵ'

inter li kaj nub'.

5.3. 卜算子 Busuanzi aŭ Divenisto; (55,75)x2

格式要求为:

* Busuanzi (aŭguristo) : ĉina fiksforma poemo el du strofoj el versoj de 55,75 silaboj laŭ rimaranĝo de x,a,x,a (x = senrima).

Komencantino 柯敏才原作/国柱汉译

Zamenhofa Tago 2006 二〇〇六年柴诞节

——laŭ ĉinesko Busuanzi 卜算子

portreto Ava 高挂大师相

hel-verda flago 绿星旗辉耀

solena datreven' de 世界语者齐欢庆

Zamenhof-Tago 柴诞节来到

Ni sang-ĵuras por 我们发誓言

estonta ago 未来把力效

Esperanto ne estas 须知世界语并非

ŝajna imago 凭空想像造

5.4. 调笑令 Tiaoxiaoling aŭ Flirta Kanto; 2,2*,6;6,6;2**,2*,6 | aAa bb cCc

它的写作难度最大。难在要求使用回文词 palindromo。请看 Vejda 在 2007 年 2 月 18 日（春节大年初一）时写的一首 ĉinesko 调笑令:

Vejda:

novjara beno

——laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling aŭ Flirta Kanto

ĝoje, ĝoje

ĉiujare foje

kun novjara beno

al sukcesa veno

nove, nove

ekmarŝu denove

全诗共六行，押 para rimo(成双韵 aa,bb,cc)。乍看并不稀奇，可是第 5 行的单词 no-ve 必须是由第 4 行末尾的单词 ve-no 用颠倒音节顺序的方法得到。这种回文在汉语中已属不易，在其他外语中则几乎没有可能达到。由此也令人赞叹世界语构词的灵活与奇妙!

5.5. 钗头凤 Chaitoufeng aŭ Feniksa Harpinglo; (3,3,7;3,3,44,1,1*,1*)x2 | aaa;bbxbbBB

格式要求为：共两个诗段，分别为 3,3,7;3,3,4,4;1,1,1 个音节，押 a,a,a,b,b,x,b,bBB 韵。难在这三个单音节的小词要相同。

下面是 Guozhu 写的一个样品，曾发表在 La Mondo 上。

KURTA AM'

--- laŭ ĉinesko Feniksa Harpinglo

Dolĉa am',

juna flam',

lulis nin feliĉa gam'.

Ni ja tre

dubis ke
kiuj folis
pli ol ni ge ?
Ne, ne, ne !

Kurta am'
pasis jam.
Etingiĝis juna flam'.
Min ja tre
ĝenis ke
ĉio iĝis
morta pase'.
Ve, ve, ve !

看了这些例子，我们可知，几乎所有的中国词牌都是可以引入世界语的。格式上要注意的是：诗段、诗行、音节数及押韵方式要与原文相同。

responde de Li Sen

发信人(From): "gaols720"
主题(Subject): Re: gz:mesaĝo 06
发送时间: 2007-10-28 16:56:00
收件人: "huguoazhu@tom.com"

Kara amiko,

Mi estas kapitata de surprizo kaj ghojo. En unu au du tagoj vi transdonis al mi la "Koncize pri Esperanta metriko". Eble estas antaŭ du semajnoj mi provis skribi la E-poemon, kaj ankau dudek jaroj mi legis vian libron pri poemo. sed mi ĝin ne studis. Sub la helpo de via varma koro, mi devas legi kaj studi viajn dek leterojn kaj esti la bona lernanto de vi .

Li Sen

responde de Kurisu Kei

发信人(From): "Kurusu Kei"
主题(Subject): Dankon pro via detala instruo pri la Esperanta metriko kaj sendo de mia noca eseo
发送时间: 2007-10-30 12:46:48
收件人: "" <huguoazhu@tom.com>

Estimata kaj kara amiko,

Koran dankon pro via detala instruo pri la Esperanta metriko. Mi ĝin tralegis dufoje, sed malgraŭ sia koncizeco ĝi ankoraŭ restas al mi malfacile rompebla nukso, des malpli facile digestebla. mi do devus ripete mordi, maĉi, ĝis mi ĝin plene digestos. Ĉiuokaze mi admiras, ke vi ne nur ellernis ĝin sed majstre versas laŭ ĝi. Vi estas vere vortomagiisto kiel Kalocsay.

[.....]

Ĝis reskribo.

Amike
KURISU Kei

国柱心语 Koraj vortoj de Guozhu

在这一组帖子的开头，有一个“缘起”，说这一组讲格律的十封电子邮件，是一个计划外的工作。而且“国柱每年都会做一些‘计划外’的工作”。

既然已经有了中文本的《世界语诗词格律》一书，1973年出了油印版，1983年出了铅印版，2006年又有了Vejdo制作的电子版，在下址可以随意下载：

<<http://www.elperno.cn/elibro/elibroj.htm>>

0115 Esperanta Metriko 世界语诗词格律（胡国柱）

按理说，就没有必要再写这个“十封信”的新版本了。可是，那个中文本，不懂得中文的人不能够看。

这也是我常常想到的一个问题。我们的好人、好文，老外不懂中文就无从知晓。我想起了在纪念戴立明的厚厚一本专刊中，只有GZ的一篇是用双语写成的，唯一的那个世界语文本、使得老外们知道了中国世运中有这么一位（被国柱称之为）“不要钱，不要家，不要命”的侠义之士，令老外们钦佩不已。我一直看好我们的世界语学习论坛，总以为它才是中国世界语者的真正代表。可是，它的整个外貌，却不太适合国外读者阅读。

这个十讲写完后，不仅栗栖继和李森老可以看，其他任何愿意读的人，也都可以看。是否因此会有什么意外的收获呢？至少

它是第一本由中国人用世界语写的《世界语格律十讲》，时间上最新。

以前所有国外出版的《Parnasa Gvidlibro 世界语作诗指南》之类的书，从来没有关于ĉinesko（中国词牌）的内容，而这一本，有了。

有许多事情的意义，也许要在时间推移多年之后，才会让人们看得更清楚些吧。

2007-10-31